

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

*Tiu traduko estas poste iom
modifita de aliuloj, ne estas la
origina traduk-versio de Leo-
pold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trank-
vil',
La supro de l' monto lu-
miĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur';
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzis feine
La Loreleja kantad'.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhe-
lo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci'.
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo
la ondoj lin kun boat'.
Nun kuŝas li en la profundo
pro Loreleja kantad'.

...

Heinrich Heine,
Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,
daß ich so traurig bin;
ein Märchen aus alten Zeiten,
das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,
und ruhig fließt der Rhein;
der Gipfel des Berges funkelt
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzet
dort oben wunderbar,
ihr goldnes Geschmeide blitzet,
sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kam-
me,
und singt ein Lied dabei;
das hat eine wundersame,
gewaltige Melodei.

Den Schiffer im kleinen Schiffe
ergreift es mit wildem Weh;
er schaut nicht die Felsenriffe,
er schaut nur hinauf in die Höh.

Ich glaube, die Wellen verschlingen
am Ende Schiffer und Kahn;
und das hat mit ihrem Singen
die Lorelei getan.

...

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk “Buch der Lieder”, Kapitel “Die Heimkehr”, Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de> unter: http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1131&kapitel=12&Hash=eb14eca2272#gb_found. Vidu ankaŭ: http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html. La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html.